**********************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2020/01 (septembro 2020)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

**********************************************************************************

Per tiu ĉi informilo ni peras interesaĵojn pri instruado, pri eventoj rilate al kursoj, klerigado kaj alvokojn, novaĵojn.

Karaj Gekolegoj! Jen grava alvoko:

AGEI jarĉefkunveno prokrastita! Pro la neeblo organizi kunvenojn pro la koronaviruso kaj pro la nuligo de la Germana Esperanto-Kongreso je Pentekosto 2020, en kies kadro ni laŭ tradicio organizas nian kunvenon, ankaŭ ni devis forŝovi nian laŭstatutan jarĉefkunvenon.
GEA kunsidos ĉi-jare inter 23-25 oktobro en Osterode am Harz (12km-ojn for de Herzberg), do jen la bona eblo partopreni kaj enkadre de tiu evento organizi la AGEI-jarĉefkunvenon.

## Einladung: VDEL-AGEI Mitgliederversammlung

Der Verband Deutscher Esperanto-Lehrer (VDEL-AGEI) lädt zu seiner jährlichen Mitgliederversammlung in Osterode am Harz ein.
Diese findet **am Samstag**, den **24.10.2020** in Gaststätte Freiheiter Hof, Hauptstraße 9, 37520 Osterode am Harz, http://freiheiterhof.de statt. Beginn ist um **13:30 Uhr**.
Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht. Der Vorstand erwartet daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

## Invito al: Jarĉefkunveno de AGEI

La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) invitas ĉiujn siajn membrojn al la ĉi-jara ĉefkunsido, okazonta en Osterode am Harz. La AGEI-kunveno komenciĝos je **13:30 en sabato, la 24an de oktobro 2020 en la restoracio Freiheiter Hof, Hauptstr. 9, 37520 Osterode am Harz**, http://freiheiterhof.de/.

Proponata tagordo:

1. elekto de la gvidanto de la kunsido. Salutado, malfermo.
   Elekto de protokolanto, kontrolo de laŭstatuta invito kaj decidpovo
2. decido pri la tagordo
3. raportoj de la kasisto kaj la kasrevizoroj
4. raporto de la estraro. Malŝarĝigo de la estraro
5. elekto de estraro
6. informado, diskutado pri instruado per interreto
7. pluaj aktivecoj kaj proponoj
8. laborplano por la sekva agadjaro. Decido pri loko kaj dato de la sekva jarĉefkunveno.
9. diversaĵoj

Por tiuj, kiuj ne povos ĉeesti, ni provos doni alireblon per ZOOM.
Temo: **AGEI Zoom Meeting**; tempo: en sabato, okt 24, 2020 13:30 PM (Tempozono: Amsterdam, Berlin, Rome)
Rekta ligilo al Zoom Meeting: https://us02web.zoom.us/j/3691595727
Meeting ID: 369 159 5727
Pasvorto: 20201024

Koran bonvenon!
Kun multaj salutoj kaj danko al ĉiuj, kiuj per membreco kaj agado subtenas nian asocion,


Zsófia Kóródy
AGEI-Vorsitzende/AGEI-prezidanto

Ni informas vin, ke la membronombro estas pli-malpli stabila, iom da malkresko estas ĉiujare pro la forpaso de kelkaj maljunaj membroj. Nia jarraporto por 2019 estis sendita al ILEI kaj estas trovebla kun la financa raporto sur la AGEI retpaĝaro http://agei.esperanto-urbo.de sub Dokumentoj. Se vi ne havas retaliron kaj interesiĝas pri tiuj dokumentoj, ni volonte sendos al vi per poŝto.

Ni informas vin ankaŭ, ke la estraranoj de AGEI – al kiuj mi dankas pro la helpema, subtenema kunlaboro – estas je dispono por novelekto, do kandidatoj por la sekva 2-jara mandatperiodo.

Detalaj informoj pri la jarĉefkunveno okazonta je 13:30 en 24.10.2020:

**Atingeblo:**
Per trajno ĝis Osterode Mitte, de tie piede ĉ. 1km, ĉ. 15 minuta promenado.
Per Flixbus vi povas veturi ĝis la urbocentro. Jen la adreso de la busstacio: Dörgestraße 40 37520 Osterode am Harz (tuj ĉe la trajnhaltejo Osterode Mitte).
Per aŭto uzu la aŭtovojon 243, en la urbo serĉu la direkton al urboparto Freiheit (direkto Lerbach, Clausthal-Zellerfeld). En la stratoj ĉirkaŭ la restoracio Freiheiter Hof eblas parki senkoste. Aŭ vi povas lasi la aŭton ĉe la parkejo de la tombejo (Scheerenberger Str. 1, ĉ. 400m de la restoracio).




**Tranoktado:**
Estas pluraj feriodomoj en la proksimeco kaj jen kelkaj hoteloj:
Hotel garni Börgener, Hoelemannpromenade 10a 37520 Osterode am Harz Tel: 05522 / 9099-0 Mail: hotel-boergener@t-online.de www.hotel-boergener.de
EZ: 58,50 Euro mit Frühstück DZ: 88,50 Euro mit Frühstück

Hotel Harzer Hof, Bahnhofstr. 26 37520 Osterode Tel: 05522-50550 www.hotel-harzer-hof.de
EZ: 60 Euro mit Frühstück DZ: 95 Euro mit Frühstück

Hotel zum Röddenberg, Steiler Ackerweg 6 37520 Osterode info@hotel-zum-roeddenberg.de www.hotel-zum-roeddenberg.de
EZ: 75 Euro mit Frühstück DZ: 113 Euro mit Frühstück

La junulardomo: (Jugendgästehaus) c. 10-15 min . piede de trajnhaltejo Osterode Mitte resp. de Restaurant Freiheiter Hof. Dulita ĉambro: 22,50 € kun matenmanĝo, luado de litaĵo kostas 3,90 €
Rezervado: Frau Blasche-Fuhrmann, jgh.harz@osterode.de, basche-fuhrmann@osterode.de

**Manĝoj:**
Speciala oferto dum la semajnfino por la kunsidantoj en la restoracio de Freiheiter Hof
Matenmanĝo (abunda, bufedstile servita) en sabato (24.10.2020) aŭ dimanĉo (25.10.2020) 7,50€
Por tag- respektive vespermanĝoj en vendredo, sabato kaj dimanĉo (kun * ankaŭ por vegetaranoj) vidu la aldonitan tabelon (ĉe mendo diversaj kombinaĵoj eblas).

Laŭ interkonsento kaj antaŭa deziro pro speciala dieto, ktp. laŭ-menukarta aŭ individua mendo ankaŭ eblas. La menukarton vi trovas ĉe http://freiheiterhof.de/speisekarte

Bonvolu laŭeble antaŭmendi la manĝojn ĝis lundo, la 19-a de oktobro, per mesaĝo al Zsófia Kóródy (zsofia.korody@esperanto.de)

**Subvencio:**
Se vi ŝatus partopreni en la kunveno kaj bezonas financan subtenon, bv. ĝustatempe kontakti min.

## Speciala menuo

| Nr. | **Vorspeise** | **Hauptgericht** | **Beilage** | **Dessert** | **Preis €** |
|---|---|---|---|---|---|
| 1. | | Suppe „Jókai“ (Eintopf mit Gemüse, Bohnen, Wurst, Eiernudeln) | Brot | Dessert Creme (Schokolade, Sahne, Frucht-Dekoration) | 6,50 |
| 2. | Gemischter Salatteller mit Dressing | Ungarisches Rindergulasch | Salzkartoffeln oder Nudeln | Dessert Creme | 13,00 |
| 3. | Gemischter Salatteller mit Dressing | Hähnchengeschnetzeltes + Champignonrahmsauce | Salzkartoffeln oder Nudeln | Dessert Creme | 10,00 |
| 4.* | | Champignonrahmsauce | Salzkartoffeln oder Nudeln | | 6,00 |
| 5. | | Bratcurrywurst | Pommes | | 6,00 |
| 6. | Gemischter Salatteller mit Dressing | Frikadellen | | | 6,50 |
| 7.* | Gemischter Salatteller mit Dressing | Vegetarische Frikadellen | | | 6,50 |
| 8. | | Thunfischsalat | | | 6,50 |
| 9* | | Gemischter Salatteller mit Dressing | | | 3,80 |
| 10* | | | Pommes, Ketchup, Mayo | | 3,20 |
| 11* | | | | Dessert Creme | 3,50 |

Ni esperas je via partopreno kaj aktiva kunestado, daŭra subteno al la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj.

Kun multaj salutoj,

Zsófia Kóródy
AGEI-prezidanto

**Alvokoj, eldonaĵoj, interesaĵoj:**

1. Nia ĉefa celo estas plimultigi la kursojn pri Esperanto aŭ interlingvistiko en universitatoj tra la mondo. Kiu ajn esperantisto konas alian esperantiston, kiu laboras en universitato, bonvolu informi la Komisionon pri universitatoj de ilei ĉe renato@esperanto.org.
Kiu ajn scias pri kurso pri Esperanto aŭ interlingvistiko en universitato bonvolu informi la saman komisionon je la sama adreso.

Ĉe www.edukado.net funkcias la ebleco registri universitatajn kursojn pri Esperanto aŭ interlingvistiko. Nia ĉefa celo estas multigi tiajn kursojn tra la mondo. Ili levas la prestiĝon de Esperanto kaj instigas homojn lerni la lingvon. Pro tio mi petas vin, ke vi bonvolu iri al la paĝo: https://edukado.net/kursejo kaj registri vian kurson. En tiu paĝaro, se vi iras al la fundo de la paĝo kaj premas la vorton 'statistiko', vi trovas bildajn statistikojn pri la registritaj kursoj.
Do, se vi mem gvidas tian kurson, registru ĝin por kuraĝigi aliajn kolegojn sekvi vian ekzemplon. Se vi scias, ke tia kurso okazas en via lando, sed ne povas kontakti la instruiston, informu nin ĉe <esperanto.en.universitatoj@gmail.com>.

Krom tio ni informas vin ke en tiu ĉi malfacila periodo ni malfermis por ĉiu membro la kolekton de la instrumaterialoj, sekve vi povas libere elŝuti ion ajn el la ĉ. 900 materialoj kaj ekzerci vin en la deviga fermiteco. Ni daŭre provos disponigi al vi interesajn aferojn, bonvolu regule viziti nian retejon.

2. Bonvolu rigardi ĉe https://www.youtube.com/channel/UCvxZ3qhmQcFKzTGCR_SLHFg aŭ tajpi ĉe Youtube Esperanto+ Edukado ILEI kaj vi povos spekti kelkajn filmetojn.
Nia brazila sekciestro Aristophio Alves Filho helpas iom post iom nutri tiun kanalon per filmoj pri la agado de ILEI kaj edukaj temoj. Ni tre dankas lin.
Bonvolu fariĝi amikoj de tiu paĝo; tio ebligos al ni meti tien pli longajn filmojn.

3. Informilo por Interlingvistoj – nova numero IpI (Esperante):
Nova numero: https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2019/03/IPI_107_Final.pdf
Pli fruaj numeroj: http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/
IfI (angle): https://www.esperantic.org/wp-content/uploads/2019/03/IFI_107_Final.pdf
Pli fruaj numeroj: http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Monda Lingvaj Problemoj (CED). IpI disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ĝi enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatanoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj. Legu pli detale pri IpI kaj la lanĉo de IfI: http://www.esperantic.org/eo/2017/07/20/esf-lancas-novan-bultenon-kaj-revivigas-alian/

4. Stano Marĉek salutas kaj informas pri libera aliro al aŭskultejo, kiun prizorgas la Esperanto-biblioteko en Aalen: http://stano-auskultejo.bplaced.net/index.htm
Ĉi tie vi trovas ĉiujn fabelojn kaj librojn, kiujn Stano voĉlegis.

5. Esperanto en lernejoj
Er bietet auf seiner gleichnamigen Webseite www.esperanto-klaus.de Sachbücher und Romane zum Kennenlernen von Esperanto sowie Materialien zum Gestalten von Unterricht in Schulen und Kindergärten an. Klaus Friese el Hamburgo, pensiiĝinta instruisto, verkis etan broŝuron. Intertempe la broŝuro ekzistas en ses lingvoj (Esperanto, franca, angla, itala, germana, turka). http://esperanto-klaus.de

6. Lastatempe lanĉiĝis nova retejo, kun kalendaro de eventoj en la tuta mondo, ne nur kongresoj kaj grandaj renkontiĝoj, sed ankaŭ klubaj kunvenoj, kursoj, ktp.
Vidu: https://eventaservo.org/ <https://eventaservo.org/ (bv diskonigi al viaj konatoj, kaj mem plenigi se vi organizas iajn eventojn).

7. UNESKO-kuriero: https://en.unesco.org/sites/default/files/cou_4_18_eo.pdf